

# Solvoj

## 3.1.

1. Al Helena plaĉas orangŝuko, kafo, kaj teo. Ne plaĉas al ŝi akcidentoj kaj incendioj.
2. Al Karlo plaĉas parkoj kaj pomoj. Malplaĉas al li vekhorloĝoj, ŝafoj, malbona matematiko(?), kaj Ruselo.
3. Al Filisa plaĉas floroj kaj arboj. Ne plaĉas al ŝi vodko, ambulancoj, kaj edzo kiu nur pensas kaj ne laboras.
4. Al Karlo plaĉas Helena, pomoj, kaj artgalerioj. Al li ne plaĉas bestĝardenoj kaj Karlo.
5. Al Flora plaĉas vazoj, kolĉenoj kaj klientoj. Malplaĉas al ŝi fakturoj!
6. Al la detektivo plaĉas telefonoj kaj aŭtoj(?). Ne plaĉas al li pasportoj, ŝafistoj, ŝafoj, kaj ŝtelistoj.

## 3.2

1. soifas 2. elefanto 3. petas. 4. nun. 5. plaĉas. 6. memoris. 7. Ek

## 3.3

Vera: 1, 3, 5, 8, 10, 12.

2. Marde, ĵaŭde, sabate kaj dimanĉe la informejo estas fermita. (aŭ) La informejo estas malfermite lunde, merkrede, kaj vendrede.
4. Karlo kuras fulme rapide.
6. Besto-ĝardenoj ne plaĉas al Ruselo.
7. Tigrejo estas loko por tigroj. (aŭ) Elefantejo estas loko por elefantoj.
9. Georgo rompita la vazon de Flora.
11. Georgo soifis en la informejo, do li trinkis vodkon.

## 3.4

La vekhorloĝo sonas. Kioma horo estas? Estas kvarono antaŭ la dek-unua. Ĉu ne ekzistas vekhorloĝoj en Nov-Zelando? Kompreneble, sed vekhorloĝoj estas stultaj. Mia ne bone funkcias.

Ni iros al la urbo morgaŭ je la sepa dudek kvin. Ĉu kun Flora? Ne, ni iros sen ŝi. Kiu tago estas hodiaŭ? Hodiaŭ estas vendredo – ĉu vi forgesis? Ne, mi ne forgesis, mi simple ne sciis. Ĉu vi bone dormis en via dormosako? Kompreneble, ŝafistoj tre bone dormas. Ĉu Flora laboros en la vendejo morgaŭ? Ne, ŝi laboris tie hieraŭ. Morgaŭ la vendejo estos fermita. Ĝi estas fermita sabate kaj dimanĉe.

Kia bela kolĉeno! Ĉu ĝi plaĉas al vi? Kiom ĝi kostas? Ĉu ĝi estas multekosta? Kiaj bonaj brakhorloĝoj! Ĉu ili estas multekostaj? Ne plaĉas al mi tiu korbo. Kiu korbo? La korbo el Egiptio.

Mankas al ni minerala akvo, Georgo. Iru al la vendejo, mi petas. Survoje, diru “saluton” al s-ino Bundo. Jen via listo... prenu (ĝin)! Ho, ve! Mia vazo estas rompita! Vi kulpas pri ĝi! Balau, mi petas. Dankon. Jen vodko por vi. Ĝi certe plaĉos al vi.

Silentu! Kie estas nia mono? Ĝi estis en la tekruĉo, sed nun ĝi mankas. Ĉu ĝi estas ŝtelita? Ĉu ĝi estas sur la seĝo? Ĉu ĝi estas sub la tablo? Helpu! Telefonu al la polico! Interese... kio estas via familia nomo? Aŭskultu, s-ro detektivo: Mi ne scias, kie la mono estas. Li estas ŝtelisto! Ŝerĉu en liaj poŝoj! Kuru, Ruselo! Rapide, fulme! Haltu! Revenu!